# Vivu Eterne en Nia Memoro Kamarado Ĝu De, Granda Proleta Revoluciisto de la Ĉina Popolo!



Aldono al n-ro 9 de El Popola Ĉinio

# Funebra sciigo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ŝtata Konsilantaro pri la forpaso de Kamarado Ĝu De

Kun profunda malĝojo la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko proklamas, ke Kamarado Ĝu De, membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, forpasis pro malsano en Pekino, je unu minuto post la 15-a horo de la 6-a de julio, 1976, en la aĝo de 90 jaroj.

Kamarado Ĝu De estis eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda revolucia batalanto kaj proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj unu el la elstaraj gvidantoj de la Partio, la ŝtato kaj la armeo.

La vivo de Kamarado Ĝu De estis tiu de batalado por la komunisma afero kaj tiu de persistado en daŭrigo de la revolucio. Fidela al la Partio kaj la popolo Kamarado Ĝu De brave batalis kaj senegoisme dediĉis sian tutan energion por plenumi la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj por gajni la venkon de la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la komunisma afero. Sub la gvido de Pre-


zidanto Maŭ, Kamarado Ĝu De faris senmortajn meritojn por la Partio kaj popolo en konstruado kaj disvolvado de la nevenkebla popola armeo, en konstruado kaj ekspansiigo de la revoluciaj bazlokoj, en renversado de la reakcia regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, kaj gajno de la venko de la nov-demokratia revolucio, kaj en konstruado de la revolucia regpotenco en Ĉinio, firmigo de la diktaturo de la proletaro, kaj gajno de la venko de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj li estis kore amata kaj estimata de la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo.

La forpaso de Kamarado Ĝu De estas granda perdo de niaj Partio, armeo kaj popolo. Ni devas turni nian malĝojegon en fortojn. La tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo devas lerni de Kamarado Ĝu De la proletan revolucian spiriton kaj noblajn revoluciajn kvalitojn kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, persisti pri la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, profunde disvolvi la grandan batalon por kritiki la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Deng Hiaŭping kaj rebati la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn, firmigi kaj disvolvi la venkajn fruktojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, unuiĝi kaj batali por firmigo de la diktaturo de la proletaro, por oponado kontraŭ kaj preventado de reviziismo, por konstruado de nia lando en potencan modernan socialisman landon kaj por la venko de la komunisma afero.

Eterne vivu en nia memoro Kamarado Ĝu De, la granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo!

# Nomlisto de la Funebra Komitato por Kamarado Ĝu De

Maŭ Zedong, Hua Guofeng, Vang Hongven, Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ, Vej Guoking, Liu Boĉeng, Giang King (virino), Hju Ŝijoŭ, Gi Dengkuj, Vu De, Vang Donghing, Ĉen Jongguj, Ĉen Hilian, Li Hiannian, Li Deŝeng, Jaŭ Venjuan, Vu Gujhian (virino), Su Ĝenhua, Ni Ĝifu, Sajfudin, Song Kingling (virino), Guo Mojuo, Hju Hiangkian, Nie Jongĝen, Ĉen Jun, Tan Ĝenlin, Li Gingkjuan, Ĝang Dingĉeng, Caj Ĉang (virino), Ulanfu, Ngapo Ngavang-ĝigme, Ĝoŭ Gianjen, Hju Deheng, Hu Gjueven, Li Suven (virino), Jaŭ Lianvej, Teng Jingĉaŭ (virino), Caŭ Ji-oŭ (virino), Kang Keking (virino), Su Ju, Vang Ĝen, Ju Kiuli, Gu Mu, Sun Gian, Ŝen Janbing, Giang Hua, Gin Zumin, Hie Gingji (virino), Jang Polan (virino), Jang Ĉengvu, Liang Bije, Ĝang Zonghjun, Hiaŭ Ginguang, Ma Ning, Ĝang Jaŭci, Gi Pengfej, Vu Kingtong, Hu Vej, Lin Lijun (virino), Caj Hiaŭ, Ĝu Junŝan, Ŝi Liang (virino), Hu Juĝi, Ŝa Kianli, Gi Fang, Huang Dingĉen, Ĝoŭ Pejjuan kaj Tian Fuda



# Funebra parolado de la Unua Vicprezidanto Hua Guofeng en la funebra kunveno pri Kamarado Ĝu De

Hodiaŭ kun tre granda malĝojo ni funebras pri Kamarado Ĝu De, eminenta membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda revolucia batalanto kaj proleta revoluciisto de la ĉina popolo kaj elstara gvidanto de la Partio, la ŝtato kaj la armeo amata de la tuta popolo.

Kamarado Ĝu De estis membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Deka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso.

Kamarado Ĝu De forpasis pro malsano malgraŭ ĉia kuracado en Pekino je unu minuto post la 15-a horo de la 6-a de julio, 1976, en la aĝo de 90 jaroj.

La vivo de Kamarado Ĝu De estis tiu de batalado por la komunisma afero kaj tiu de persistado en daŭrigo de la revolucio. Fidela al la Partio kaj la popolo, Kamarado Ĝu De brave batalis kaj senegoisme dediĉis sian tutan energion por plenumi la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj por gajni la venkon de la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la komunisma afero. Sub la gvido de Prezidanto Maŭ, Kamarado Ĝu De faris senmortajn meritojn por la Partio kaj la popolo en konstruado kaj disvolvado de la nevenkebla popola armeo, en konstruado kaj ekspansiigo



Hua Guofeng, unua vicprezidanto de CK de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro faras funebran paroladon.

de la revoluciaj bazlokoj, en renversado de la reakcia regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo kaj gajno de la venko de la nov-demokratia revolucio, kaj en konstruado de la revolucia regpotenco de Ĉinio, firmigo de la diktaturo de la proletaro kaj disvolvado de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Lia forpaso estas granda perdo por niaj Partio, armeo kaj popolo, kaj la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo sentas profundan malĝojon pro tio.

Kamarado Ĝu De naskiĝis en Jilong-gubernio de Siĉuan-provinco. En siaj fruaj jaroj li aliĝis al Tongmeng-ligo gvidata de D-ro Sun Jatsen, partoprenis en la Revolucio de 1911 kaj sin okupis pri revoluciaj agadoj kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. En 1915, li partoprenis en la insurekcio en Junnan kontraŭ Juan Ŝikaj, kiu intencis proklami sin imperiestro kaj restarigi monarkion. En la batalado, li iom post iom akceptis Marksismon-Leninismon. En 1922, li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. De tiam li aktive faris revoluciajn aktivadojn sub la gvido de la Partio. En 1927, post kiam Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion, Kamarado Ĝu De partoprenis en la gvidado de la Nanĉang-a Leviĝo en la 1-a de aŭgusto kaj fariĝis vickomandanto de la 9-a Armeo de la revoluciaj fortoj. En 1928, li kun parto de la revoluciaj trupoj kiuj partoprenis en la Nanĉang-a Leviĝo sub sia gvido leviĝis en suda Hunan kaj poste marŝis al Ginggang-montaro kie ili kuniĝis kun la trupoj gvidataj de Kamarado Maŭ Zedong, kaj ili fondis la Kvaran Korpuson de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, kaj li fariĝis ĝia komandanto. De tiam Kamarado Ĝu De, sub la gvido de Kamarado Maŭ Zedong kaj sub la direktado de lia armeokonstrua linio, faris eminentajn kontribuojn por konstrui kaj disvolvi la popolan armeon kaj por konstrui kaj ekspansiigi la revoluciajn bazlokojn. De 1930, li servis sinsekve kiel komandanto de la Unua Armegrupo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, ĉefkomandanto de la Unuafronta Armeo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo, ĉefkomandanto de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo kaj prezidanto de la Milita Komisiono de la Ĉina Soveto. En 1934, li partoprenis en la 25,000-lia Longa Marŝo. En la Longa Marŝo, li faris rezolutan batalon kontraŭ la aktivadoj de renegato Ĝang Guotaŭ celantaj spliti la


Ruĝan Armeon kaj perfidi la Partion. Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1937, li laboris kiel ĉefkomandanto de la Okavoja Armeo. En la periodo de la Tria Enlanda Revolucia Milito, li laboris kiel ĉef-komandanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, Kamarado Ĝu De estis elektita kiel vicprezidanto de la Centra Popola Registaro, kaj nomumita kiel vicprezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Popola Registaro kaj ĉefkomandanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. En la Unua Tutlanda Popola Kongreso en 1954, li estis elektita kiel vicprezidanto de la Ĉina Popola Respubliko kaj nomumita kiel vicprezidanto de la Nacidefenda Konsilantaro. Kamarado Ĝu De estis elektita kiel prezidanto de la Konstanta Komitato de la Dua, Tria kaj Kvara Tutlandaj Popolaj Kongresoj.

En la Tria Plena Sesio de la Sesa Centra Komitato de la Partio en 1930, Kamarado Ĝu De estis elektita kiel alterna membro de la Centra Komitato. Ekde la Kvina Plena Sesio de la Sesa Centra Komitato de la Partio en 1934, li estis elektita seninterrompe kiel membro de la Centra Komitato kaj membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato. En la Unua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio, li estis elektita kiel sekretario de la Sekretariejo de la Centra Komitato. En la Unua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, li estis elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato kaj vicprezidanto de la Centra Komitato. En la Unua Plena Sesio de la Deka Centra Komitato de la Partio, li estis elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato.

Dum kelkdek jaroj, Kamarado Ĝu De firme plenumis la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj batalis heroe kaj malcedeme en la nov-demokratia revolucio kaj socialisma revolucio kaj en la bataloj kontraŭ en- kaj ekster-landaj klasaj malamikoj. Li estas ekzemplo lernenda por la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo.

En funebrado pri Kamarado Ĝu De, ni devas lerni lian spiriton senĉese revolucii. Li ĉiam estis fidela al la Partio kaj la popolo, diligente studis verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, firme plenumis la proletan revolucian linion

En la funebra kunvenejo



de Prezidanto Maŭ, persistis en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj batalis dum la tuta vivo por efektivigi la grandan idealon de komunismo.

Ni devas lerni lian revolucian spiriton batali kontraŭ la malamikoj firme kaj brave. Antaŭ la ferocaj klasaj malamikoj, en la jaroj de la militaj fajroj kaj en la ventego kaj ondegoj de klasbatalo, li batalis heroe kaj sinofereme kaj estis ĉiam plena de konfido pri venko.

Ni devas lerni lian noblan kvaliton servi al la popolo tutkore. Ĉiam kaj ĉie li defendis la interesojn de la Partio kaj la popolo. Diligenta, fervora kaj konscienca, li dediĉis sin tute al la revolucia afero de la proletaro.

Ni devas lerni lian bonan proletan stilon. Li persistis pri partiaj principoj, observis partiajn disciplinojn, gardis la unuecon de la Partio kaj tenis intimajn rilatojn kun la amasoj. Li estis modesta kaj prudenta, afabla kaj facile alirebla, kaj mallukseme vivanta. Li donis bonan ekzemplon per siaj agoj. Li firme oponis kontraŭ ĉiaj burĝaj vivmanieroj kaj faris senintermitan batalon kontraŭ ĉia ago kontraŭa al la interesoj de la Partio.

Kamarado Ĝu De, granda proleta revoluciisto de la ĉina popolo, forlasis nin por eterne. Ni devas turni nian malĝojegon en fortojn kaj, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, persisti pri la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, profunde disvolvi la grandan batalon por kritiki la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Deng Hiaŭping kaj rebati la dekstran deviaciisman venton celantan renversi la ĝustajn verdiktojn, firmigi kaj disvolvi la venkajn fruktojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, unuiĝi kaj batali por firmigo de la diktaturo de la proletaro, por oponado kontraŭ kaj preventado de reviziismo, por konstruado de nia lando en potencan modernan socialisman landon kaj por la venko de la komunisma afero.


Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn!





Kamaradino Kang Keking, malnova kunbatalantino kaj edzino de Kamarado Ĝu De, kaj liaj parencoj en la funebra kunveno

# La batala vivo de Kamarado Ĝu De por la komunisma afero



En 1922 Kamarado Ĝu De aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj de tiam li aktive faris revoluciajn aktivadojn sub la gvido de la Partio.






En 1934 Kamarado Ĝu De partoprenis en la 25,000-lia Longa Marŝo de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo. En la Longa Marŝo li rezolute batalis kontraŭ la aktivadoj de renegato Ĝang Guotaŭ celantaj spliti la Ruĝan Armeon kaj perfidi la Partion. Jen foto de Kamarado Ĝu De alveninta al norda Ŝenhi post la Longa Marŝo.



En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito Prezidanto Maŭ kaj Kamarado Ĝu De interkonsiliĝis pri principo de militado.





Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1937, Kamarado Ĝu De fariĝis ĉefkomandanto de la Okavoja Armeo. La foto montras, ke li alvokas en Jan-an al la komandantoj kaj batalantoj de la Okavoja Armeo, ke ili firme plenumu la politikan kaj militan liniojn de Prezidanto Maŭ kaj persistu en la rezistmilito ĝis la fino.

En 1945 Kamarado Ĝu De faris militan raporton "Pri la Batalkampoj de la Liberigitaj Regionoj" en la 7-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.



En la solena ceremonio de la fondo de la Ĉina Popola Respubliko en la 1-a de oktobro de 1949, Kamarado Ĝu De proklamis ordonon de la Ĉefstabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

En majo de 1958 Kamarado Ĝu De partoprenis en konstruado de la Dektri-Maŭzolea Akvokonservejo de Pekino





En marto de 1962 Kamarado Ĝu De aŭskultis lecionon kune kun studentoj en la Komunisma Labora Universitato de Gianghi





Kamarado Ĝu De estis en inspektado al trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.






En aŭgusto de 1973 Kamarado Ĝu De balotis en la Deka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio por elekti la Dekan Centran Komitaton.





En januaro de 1975 Kamarado Ĝu De prezidis la Unuan Sesion de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso.



Kamarado Ĝu De diligente studis verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkojn de Prezidanto Maŭ, rezolute plenumis la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ, persistis en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj batalis dum la tuta vivo por efektivigi la grandan idealon de komunismo.




Laboristoj, kamparanoj, soldatoj, kadroj kaj lernantoj de Pekino profunde funebras pri Kamarado Gu De en solena ceremonio.